

tuta korpo per karoj, kaj marŝis duope, kiel ankaŭ la soldatoj. Post la korteganoj sekvis duope la reĝaj infanoj; ili marŝis mano en mano kaj ĝoje saltadis. Post ili sekvis la gastoj; la plimulto el ili estis gereĝoj, kaj inter ili Alicio rimarkis la Blankan Kuniklon. Ĝi parolas rapide kaj eksciteme, kaj ridetas ĉe ĉiu diro de la aliaj. Post la gastoj solene marŝis la Kera Lakeo, kiu portas sur velura kuseno la reĝan kronon; kaj en la fino de ĉi tiu majesta procesio jen la REĜO kaj DAMO KERAJ!

Alicio iom dubis ĉu ŝi ni devas—same kiel la tri ĝardenistoj—kuŝi horizontale sur la ventro. Sed ŝi ne povis memori ke ekzistas tia regulo pri procesioj “kaj krome” pensis ŝi “por kio utilis la procesioj, se la ĉeestantoj devus kuŝi sur la ventro, kaj sekve ne povus vidi ilin?”

Do, ŝi staris serene, kaj atendis.

Kiam la eminentuloj alvenis apud Alicion, ĉiuj haltis kaj rigardis ŝin.

La Damo, turnante sin al la Lakeo, demandis severe: “Kiu *ŝi* estas?”

La Lakeo nur klinis sin riverence kaj ridetis.

“Vi idioto!” diris la Damo, kaj skuis malpacience la kapon. Poste ŝi turnis sin rekte al Alicio, dirante: “Kiel oni nomas vin, infano?”

“Mia nomo estas Alicio, se plaĉas al via

Dama Moŝtino” ŝi respondis tre ĝentile, sed ŝi aldiris al si aparte: “Ili ja estas nur aro da ludkartoj; mi certe ne devas timi ludkartojn.”

“Kaj kiuj jenaj estas?” diris la Damo, montrante al la tri ĝardenistoj, kiuj kuŝas ĉirkaŭ la rozarbo. Ĉar ili kuŝis sur la ventro, kaj la desegno sur la dorsoj estis identa por la tuta aro, pro tio la Damo ne povis diveni ĉu ili estas ĝardenistoj, soldatoj, korteganoj, aŭ ĉe tri el siaj propraj infanoj.

“Kiel ajn *mi* povas sciigi tion?” diris Alicio, “ĝi tute ne estas mia afero.”

(Sed malgraŭ la ekstera kuraĝo, ŝi interne iom tremis.)

La vizaĝo de l' Damo purpuriĝis pro kolerio; fikse rigardeginte Alicion dum unu momento, same kiel rigardegas la sovaĝaj bestoj, ŝi kriegis: “Oni senkapigu ŝin, oni sen—”

“*Oni sen-sencaĵon* parolas!” diris Alicio tre laŭte kaj tre firme; kaj la Damo silentiĝis!

La Reĝo metis la manon sur ŝian brakon, dirante per tre malkuraĝa voĉo. “Konsideru, karulino, ke ŝi estas nur infanino.”

La Damo malestime turnis sin for de li, kaj ordonis al la Lakeo, ke li turnu ilin supren. La Lakeo zorge aliflankigis ilin laŭ la ordono, levante ilin per la piedo.

“Levu vin” diris la Damo per laŭta, sibla voĉo. La tri ĝardenistoj tuj levis sin sur la

